

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

# La Espero

2017:1

## ARKONES

Facile alirebla, almenaŭ de la suda Svedio, estas Poznan, Pollando, kie okazas Arkones ĉiun septembron. La evento estas sendependa kultura kaj arta esperantista aranĝo – granda manifestacio de Esperanto-kulturo.

En septembro, kiam mi partoprenis lastfoje, mi aŭskultis inter alie Mikaelo Bronŝtejn kaj Tomio. La aranĝon partoprenis pli ol 200 personoj.

Kaptu la okazon ĝui esperanto-kulturan aranĝon en septembro 2017. Pli da informo ĉe <http://arkones.org>

*Bengt Olof Åradsson*



## Gratulojn al Fanny kaj Juto

Fanny Tjäder el Stockholm edziniĝis, kaj nun havas la nomon Fanny Kawabata-Tjäder. La edzo Juto kaj ŝi loĝas en Tokio en Japanio. Por la geedziĝo okazis beniga ceremonio en preĝejo en Stockholm. Sur la foto estas ankaŭ gepatroj kaj frato de Fanny. La nov-geedzoj parolas esperanton hejme, Juto laboras en internacia firmao, kaj Fanny studas la japanan lingvon.

*Ulla Luin*

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2017 • 105-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

**E-post till redaktionen:** laespero@esperantoforbundet.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress, Råå

**Prenumeration:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Besöksadress:** Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**E-post:** svenska@esperantoforbundet.se

**Nätsida:** www.esperantoforbundet.se

**Öppettider:** Esperanto-Centro har begränsade öppettider. Ring i förväg!

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123

**Medlemsavgift:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,  
Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.esperanto-gbg.org/eldona/

**E-post:** eldona@esperantosverige.se

**Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** www.esperantogarden.se

**E-post:** info@esperantogarden.se

**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperantoforbundet.se

	<i>Stoppsdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan. sv

## Lite om styrelsens administrativa arbete

SEF-styrelsen har under de senaste åren ständigt arbetat med att modernisera och effektivisera det administrativa arbetet inom förbundet. Bokföringen och medlemsregistret har överförs till ett nytt system som underlättar hanteringen och ger möjlighet att få ut fler typer av rapporter. Diskutejo fungerar bra och används flitigt av styrelsen. Tyvärr ser vi inte så många inlägg från våra medlemmar, som därmed missar sina chanser att uttrycka sin mening och vara med och påverka. Ett samarbetsverktyg, TitanPad, som vi i styrelsen också flitigt har använt för gemensam protokollskrivning samt författande och redigering av dokument, kommer att stängas ner under året. Vi måste därför hitta nya vägar att gå. Vi provar andra system som också ska göra det lättare att följa ärendenas gång under hanteringen och hitta tillbaka till gamla beslut. "Hur var det nu vi bestämde?" Detta arbete har sinkat oss när det gäller uppdateringen av hemsidorna, som ju är en mycket viktig uppgift. Enligt stadgarna är information om esperanto och språkliga rättigheter förbundet viktigaste uppgift.

Ett resultat av att vi ur det nya bokföringssystemet kunde skicka ut avier för medlemsavgiften tillsammans med sista numret av La Espero för 2016 är att större delen av de direktanslutna medlemmarna betalade sin avgift redan före årsskiftet. Avgiften är ju ett sätt att visa att man stöder en verksamhet och det tar styrelsen till sig.

## Några goda exempel och framtidsplaner

I förra styrelserutan skrev styrelsen i lite skarp ton att få åtagit sig att medverka i lokala kongresskommittén, LKK, de senaste åren. Detta är, åtminstone än så länge, sant för vårens kommande kongress, och har varit sant för tidigare kongresser, men det är förstås viktigt att även framhålla goda exempel från föregående år som i Uppsala och förra årets kongress i Gdansk. Kongressen i Gdansk ordnades i samarbete mellan Malmöklubben och den polska klubben Toronto i Trestadsområdet, och var mycket välorganiserad med avseende på boende, utflykter, musikframträdanden, föredrag och andra aktiviteter. Kommande år finns idéer om fler gränsöverskridande samarbeten med förbunden i Danmark och Norge, men om det ska bli av krävs förstås engagemang på flera fronter.

## Både nytta och nöje

För att kongresserna inte bara ska vara en samling årsmöten för olika esperantoorganisationer, behövs förslag på intressanta programpunkter som lockar deltagare: föredrag, diskussionsämnen, underhållning, aktiviteter och utflykter. Att kongressen hålls på en trevlig plats som blir en del av upplevelsen, att det finns möjligheter till måltider och övernattnings till skäliga priser. Och inte minst att några också kan vara behjälpliga med själva genomförandet. Ingen ska behöva göra allt, men många skulle kunna göra något, och det är här en kongresskommitté kommer in.

Forts sid 4

## På historisk mark

Historien har Västergötland spelat en betydande roll, från Folkvandringstiden på 400- och 500-talen e.Kr, över vikingatiden med dess kontakter med fjärran länder och kristendomens införande, till Stormaktstiden med dess herremän och frälsegårdar. Skara stift, det första på svensk mark, grundades 1014.

Jan Guillou har förlagt sin berättelse om tempelriddaren Arn Magnusson till Västergötland. När Arn kommer tillbaka från sitt påtvingade korståg till Det Heliga Landet bosätter han sig på gården Forsvik tillsammans med sin älskade Cecilia. Arn har under sin exil blivit rik och använder en del av sin förmögenhet till att utveckla Forsvik till ett hantverks- och handelscentrum och till att utbilda hundratals forsviksbor till riddare. Arns sonson Birger Magnusson blir med tiden hela Sveriges Birger Jarl.

Verklighetens Forsvik kan bjuda på museum i det bruk vars grundande går tillbaka till 1686 och kvarn med historia från före 1400-talet. Kanalen och slussen byggdes i början på 1800-talet.

## Sur historia teritorio

En la historio Vestrogotio ludis gravan rolon, ekde la Epoko de la Grandaj Popolmigradoj en la 5-a kaj 6-a jarcentoj, tra la vikinga epoko kun siaj kontaktoj kun foraj landoj kaj la enkonduko de la kristanismo, ĝis la tiel nomata Epoko de la Grandpotenco kun siaj grandsinjoroj kaj nobelaj bienoj. La diocezo de Skara, la unua sur sveda tero, estis fondita en la jaro 1014.

La tre konata sveda verkisto Jan Guillou lokigis sian rakonton pri la templokavaliro Arn Magnusson en Vestrogotio. Kiam Arn revenas de sia devige altrudita krucmilito en la Sankta Lando li ekloĝas en la bieno Forsvik kun sia amata Cecilia. Arn dum sia ekzilo riĉiĝis kaj li uzas parton de sia kapitalo por evoluigi Forsvik al centro por metista produktado kaj komerco. Krome li edukas centojn da forsvikanoj por fariĝi templokavaliroj. La pranepo de Arn, Birger Magnusson, pli poste fariĝos Birger Jarl (en eo proksimume "duko") de la tuta Svedio.

Reale Forsvik havas muzeon en la forĝejo, kiu fondiĝis en 1686 kaj muelejo kun historio de la 14-a jarcento. La kanalo kaj kluzo estis konstruitaj komence de la 19-a jarcento.

## Preliminärt program

Fredag 26/5

Em Ankomst och inlogering

Kväll Diskussion om årskongressernas vara eller icke vara

Lördag 27/5

Fm kl 10.00 Årsmöte Eldona

Kongressinvigning

SEF-styrelsen informerar och svarar på frågor

Em kl 13.00 SEF:s årsmöte  
ILEI:s årsmöte  
Besök på muséet med guidning  
Rondo Langlet

Kväll Middag

Söndag 28/5

Fm KELL, andakt och årsmöte

Kortare diskussion: "Vilka är SEF:s viktigaste uppgifter?"

Kongressavslutning

Båtutflykt med fika och snabbkurs för intresserade i lokalbefolkningen

Em Hemfärd

Kaffe/te med fikabröd kommer att vara tillgängligt under lördagen. Lunch äter den som vill på någon av serveringarna i byn (eller lagar själva i vandrarhemmet). Vi åtar oss att boka bord till den som uttrycker önskemål om detta vid kongressanmälan.

## Avgifter

Vuxen/ungdom (t.o.m. det år man fyller 21)

Fram till den 31 mars: 400/200 kronor

Fram till den 31 april: 500/250 kronor

Efter den 1 maj: 600/300 kronor

Fullständiga uppgifter finner du på [www.esperantosverige.se](http://www.esperantosverige.se)

Anmälan görs på formulär i EsperantoSverige eller (om du inte har tillgång till dator) på telefon 08-340800 (telefonsvarare).



## Preparaj diskutoj pri vortaro de Roland

En decembro 2016, la manuskripto de la esperanto-sveda vortaro de Roland Lindblom (1931–2016) estis transdonita al la estraro de Eldona Societo. Temis pri preskaŭ 2.000 paperaj paĝoj, kiuj ĝis tiam ekzistis nur en unu ekzemplero, grandparte manuskribitaj sed partete skribitaj surpapere per tradicia tajpilo. Leif Nordenstorm transprenis la manuskripton, kaj promesis atenti pri plia laboro.

Dum decembro la tuta materialo estis elektronike skanita, en la formo de simplaj bildoj (pdf). Tiu laboro havis du celojn. Unue signifas ke ekzistas sekureca kopio. Due tiu sekureca kopio estas tiel bonkvalita, ke eblas labori per ĝi sen perpoŝta dissendo de partoj el la papera manuskripto.

En januaro 2017 komenciĝis laboro testi komputilajn net-skribojn, por vidi kiujn problemojn necesas solvi, kiam temas pri tekniko, kaj kiam temas pri tiaj notoj kiuj devas aperi je la vortoj en vortaro. Eblas vidi el la diskutoj, ke la partoprenantoj havas bonajn diversajn spertojn kaj sciojn.

Unuaj provoj pri litero "U" jam troviĝas en la diskutejo de [intere.se](http://www.intere.se). Oni trovas ĝin sub [www.intere.se](http://www.intere.se), rigardu ĉe "Konstanta kongreso", uzu menuon "Diskutejo", kaj serĉu sub "Forumo", kie vi trovas "Temo: Esperanto-sveda vortaro". La diskutojn partoprenas tiuj, kiuj anoncis sin por labori volontule, sed ĉiuj, kiuj komprenas la svedan kaj esperanton, povas legi la diskutojn.

*Ulla Luin*

## Lär dig Esperanto flytande

På söndag den 28/5, dvs i anslutning till kongressen, kl 10:00 avgår M/S Sandön på en tvåtimmarsstur.

Ombord kommer en nybörjarkurs för allmänheten att äga rum.

Båtturen, som förutom en nybörjarkurs för intresserade, är även kongressens utflykt.

Det finns möjlighet att avsluta turen i Forsvik och äta lunch där innan hemresa. Ombord kommer det även att finnas fika.

Båtturen ingår i kongressavgiften, men kostar 50:- för övriga. Sprid gärna informationen till släktingar och vänner i trakten.

Närmare information i [Esperantosverige.se](http://Esperantosverige.se).

*LKK*

## KER-ekzameno en Malmö

Se minimume 5 interesiĝantoj aliĝos, ni okazigos KER-seminaron en la 10-a aŭ 17-a de junio 2017.

Bonvolu sendi vian eventualan intereson al: [ilei-se@outlook.com](mailto:ilei-se@outlook.com).

Interesiĝantoj ricevos pli da detaloj pri la ebleco.

*Sten Svenonius*

## Nova filmo okaze de Peĉa Kuĉa

Karaj amikoj, novan filmon mi pretigis post multaj problemoj. Vi povas spekti ĝin en mia Facebook [fejsbuko] aŭ serĉi ĝin skribante la titolon en Google: Det Internationella Språket i Västerås.

Ĝi estas 33 min longa kaj parte filmita dum Peĉa Kuĉa vespero en la Konsertdomo pasintjare. Ĝi enhavas multe da muziko kun E-kantado.

Multe da sukceso,  
*Wim Posthuma*

Forts.  
styrelserutan

### Inte nödvändigtvis lokalt

Med verktyg som Skype – eller för den delen telefon och e-post – kan medlemmarna vara utspridda i landet, men ändå samarbeta och utbyta idéer. Kanske borde det börja kallas DKK, Distribuita Kongresa Komitato? Styrelsen måste förstås bistå med ramar för kostnader, ta beslut som behövs, och skriva på sånt som behöver

skrivas på, men att föreslå och kanske rentav åta sig att hålla i någon aktivitet kräver inte direkt någon firmateckningsrätt.

### Spindel i nätet

UEA har en funktionärspost KKS, konstant kongresssekreterare. En sådan bör sitta med i kongresskommittén – lokal eller distribuerad – i flera år i rad, för att

samla på sig bra och dåliga erfarenheter, dokumentera rutiner, och inte minst bidra till att varje års kommitté inte behöver börja från noll och "uppfinna hjulet" på nytt. Vi vill också införa en sådan – är du intresserad så hör av dej till styrelsen: [estraro@esperantoforbundet.se](mailto:estraro@esperantoforbundet.se)!

*Styrelsen*

## 14 ungdomar samlade – nytt nätverk skapas

Början till ett nätverk av unga esperantister i Sverige har satts igång. Hittills är vi 14 personer, både SEF medlemmar och utomstående. Några bor i södra Sverige, andra i mellersta, och ytterligare ett par stycken i Norrland. Träffarna sker via internet, med verktyg såsom Skype.

Nya deltagare varvas via inlägg i olika kanaler som Duolingo, Lenu och Facebook. Kontakta [ingrid.berglund99@gmail.com](mailto:ingrid.berglund99@gmail.com)  
*Ingrid Antonia Berglund*



## Esperanto-Gården i Lesjöfors

### Laborrenkonto

28 april – 1 maj 2017  
 Ni preparigas kune por la somera sezono.

### Somera kurso

29 juni – 2 juli 2017  
 La tradicia somera kurso okazos kun pluraj niveloj, ankaŭ infana grupo.

### Kultura Esperanto-Festivalo

3 – 9 juli 2017

### Arbetsvecka

28 april – 1 maj 2017  
 Vi umgås och ställer i ordning inför sommaren.

### Sommarkurs

29 juni – 2 juli 2017  
 Esperanto-Gårdens traditionella sommarkurs (flera nivåer, även barngrupp).

### Kultura Esperanto-Festivalo

3 – 9 juli 2017

## Internacia renkontiĝo “ORIGANTO-1” – Origamio + Esperanto 24-31 majo 2017

Kijiva klerig-kultura centro “Esperanto” sin turnas al Vi kun la peto informi geamikojn pri la nova renkontiĝo “ORIGANTO”, dum kiu Esperantistoj lernos kaj praktikos origamion, origamiistoj lernos kaj praktikos Esperanton! La renkontiĝo okazos 24 – 31.05.2017 apud Kijivo, ĉefurbo de Ukrainio.

Ni, esperantistoj, al kutimiĝis al renkontiĝoj, kiam ni plene okupiĝas pri esperantaj aŭ ĉirkaŭesperantaj aferoj... Ni proponas malfermi nian socion kaj inviti al ni origamiistojn! Ni alvokas esperantistojn en la tuta mondo trovi origamiistojn en siaj urboj, rakonti al ili pri Esperanto kaj inviti al nia renkontiĝo “Origanto-1”. Kaj ni reciproke malfermu por ni mirindan mondon de ESPERANTO kaj ORIGAMIO!

Kontakto por plia informo:

Mikaelo Lineckij,  
 Ĉefdelegito de UEA por Ukrainio,  
 Kunordiganto de la renkontiĝo  
[origanto@ukr.net](mailto:origanto@ukr.net)  
[lineckij@bigmir.net](mailto:lineckij@bigmir.net)  
 Skajpe: m-urso  
 Telephone: +38063 8493193 (Viber)

## Kara amiko,

La franca Esperanto-KulturDomo en Kastelo Greziljono deziras okaze informi vin pri sia programo kaj proponas al vi aliĝi al sia nur-informa dissendolisto. Se vi akceptas ricevi informojn, bv aliĝi al nia dissendolisto, sendante ajnan mesaĝon al tiu adreso: [esperanto-informas-subscribe@yahoogroupes.fr](mailto:esperanto-informas-subscribe@yahoogroupes.fr)

Tuj poste vi ricevos aŭtomatan peton konfirmi (en franca lingvo), simple respondu al tiu konfirmpeta mesaĝo.

Kore salutas la teamo  
 por Greziljono [gresillon.org](http://gresillon.org)



## Peto pri traduko-helpo

Kontaktförfrågan från besökare på [esperanto.se](http://esperanto.se)

Tre estimata gesinjoroj, mi kreas ludon pri eŭropaj lingvoj kaj eŭropaj valoroj. Dudek landoj, kaj mi bezonas traduki vortojn en dudek kvar lingvojn. Ĉu vi povus helpi min por traduki la vortojn en vian lingvon? Kiam la ludo estos finita, vi povos vidi ĝin en <https://reseaesperanto82.jimdo.com/>  
 Antaŭdankon.

*Daniel*  
 <dlm.anim@free.fr>

### Hej esperantister!

Jag vill komma i kontakt med esperantister i Hälsingland. Skriv gärna en rad till: [jorgen.mohlen@gmail.com](mailto:jorgen.mohlen@gmail.com)  
 Vänligen

*Jörgen*

### Saluton esperantistoj!

Mi volas havi kontakton kun esperantistoj en Hälsingland. Bonvolu skribi linion al: [jorgen.mohlen@gmail.com](mailto:jorgen.mohlen@gmail.com)

*Amike*  
*Jörgen*

## La oka Junulara E-Semajno

La nova jaro 2017 estis bele festata de esperantistoj en Waldheim am Brahmsee en norda Germanio. Laŭ mia impresoj, estis tre taŭga ejo por junulara renkontiĝo. Troviĝas tie multaj domoj kaj dometoj en kiuj oni organizis prelegojn, diskutron-

dojn, kinejon, koncertojn, manĝojn, dancadon, tabloludadon, drinkejon kaj gufujon.

Kompreneble estis ankaŭ loĝejoj, sed laŭklaĉe oni dormas malmulte dum JES! La sola malavantaĝo estis la fakto, ke la ejo troviĝis for de ajna urbeto. Mi alvenis vespere per ŝoforo kaj pro la malhelo mi sentis vere kvazaŭ mi troviĝis meze de nenio! Tiu zorgo foriris rapide kaj dum semajno mi vidis Esperantujon fizike aperi en ĉi tiu germana "arbarhejmo".

La programo estis tre bona. La interkona vespero estis gaja, kun kantado de "Frato Jako" en diversaj lingvoj kaj popola danco. Dum la semajno mi iris al kelkaj prelegoj kaj diskut-rondoj. Temis pri matematika, la kosmo, feminismo kaj Esperanto-literaturo. Mi ankaŭ ĝuis du ekskursojn: unu noktan al observatorio en Kiel, kaj unu tutagan al Lubeko. La organizanto tre diligente ĉiĉeronis nin kaj tradukis priskribojn faritajn de germanaj lokanoj. Mi vidis du el kvar koncertoj: de La Perdita Generacio kaj Jonny M. Tamen tio kion mi plej ŝatis estis babili kun samideanoj. Multajn amikojn mi revidis, kaj multajn novajn mi ekhavis.

Mi devas krome laŭdi la manĝaĵojn. Ili estis tre bongustaj, nur estis iom fremda al mi la germana kutimo ne pli ofte ol tagmeze manĝi ion varman.

Mi ne estis la sola sveda partoprenanto, ĉirkaŭ dek aliajn mi trovis. Niaj najbaraj landoj Finnlando, Norvegio kaj Danio ĉiuj estis reprezentataj. La plej granda grupo ĉe la renkontiĝo kompreneble estis la germanoj, sed mi ankaŭ parolis kun homoj el Francio, Pollando, Nederlando, Hispanio, Rusio, Aŭstralio kaj Brazilo.

Dum kelkaj momentoj mi trovis min mem mirantan pri la tuta situacio. Kian belan lingvon ni havas! Antaŭ kvar jaroj mi eĉ ne sciis ke Esperanto ekzistas, kaj nun mi povas tute bone kompreni sufiĉe komplikajn fakajn prelegojn, ĝui koncertojn kunkantante kaj diskuti sociajn problemojn.

JES estis al mi tre bonetosa renkontiĝo kun multe da ŝercoj, helpemo, ĝojo, kaj amikeco. Kiel multaj el la aliaj partoprenintoj, mi pripensas veni al Szczecin por la 9a JES. Sed antaŭ tio restas jaro, kiu espereble estos plena de esperantumado!

Ingrid Antonia Berglund



La koncerto de Jonny M

## Ret-informilo de la eldonejo KAVA-PECH

Mia eldonejo KAVA-PECH funkciigas novan version de la paĝaro kun la sama retadreso kiun havis la antaŭa; rekte al la libroj en Esperanto gvidas jena ligilo: [www.kava-pech.cz/esperanto](http://www.kava-pech.cz/esperanto)

Tie ankaŭ eblas mendi neregulajn retajn informilojn. Mi neniukaze volas iun ajn ĝeni per la nedezirataj varbmaterioj, sed jes informi la interesigantojn.

Jen la lastaj Eo-novaĵoj de KAVA-PECH:

- **La Vojo al Harmonio** J. A. Komenius - L. L. Zamenhof. Eseo pri la vivoj, verkoj kaj misioj de Komenio kaj Zamenhof.
- **Home en senhomeco – Militaj impresoj** Fare de la konata aŭstra esperantisto Martin Stuppniĝ estas memuaroj, en kiuj la aŭtoro priskribas siajn memoraĵojn el la milito, kiam li estis devigita batali por la venko de la Tria Imperio.

- **Spirita revolucio en la koro de Eŭropo** La libro estas verkita en la formo de galerio de elstaraj personoj en la ĉeĥa historio kaj ĝi prezentas fundamentojn de la ĉeĥa spirita tradicio – la tradicio de humanismaj idealoj.
- **Heredantoj de silentado** Fare de Sabine Dittrich estas romano, kies fabulo respegulas la komplikajn rilatojn inter germanoj kaj ĉeĥoj en la tempo post la 2a mondmilito.

Granda peto al vi: Se vi, krozante tra la nova retejo de KAVA-PECH trovos ajnan eraron, misfunkcion aŭ nekutimaĵon, mi tre petas vin sendi al mi la informon prian, ke ni povu ĝin ripari. Antaŭdankon.

Amike vin salutas  
Petro Chrdeľ



## Renkontiĝo kun filipinaj esperantistoj

**D**um januaro 2017 mia edzo kaj mi, kiel kutime jam dum kelkaj jaroj, vojaĝis en sudorienta Azio. Ĉi-foje ni vizitis la Filipinojn kaj la malaiziajn partojn de Borneo. En Manilo ni renkontis anojn de la Filipina Esperanto-Junularo (FEJ), gvidata de la fervora kaj treege kapabla Albert Stalin Garrido. Li gvidis nin tra la centraj partoj de Metro Manila, kiu estas urbego konsistanta de 17 diversaj urboj kun entute proksimume 15 milionoj da enloĝantoj.

Dum kluba renkontiĝo ni interparolis, interŝanĝis informojn kaj spertojn – kaj donacojn. Mi kunportis kelkajn librojn de la stoko de SEF kaj kiel dankesprimon ricevis bildon, pentrita de Tereza.

Filipina Esperanto-Junularo petis aliĝon al TEJO, kiu unuvoĉe akceptis la kandidatiĝon. Jen kelkaj vortoj el la jarfina raporto de FEJ:

Filipina Esperanto-Junularo, nuntempe la sola Esperanto-organizo en Filipinoj, estas ĝis nun la plej aktiva organizo en la historio de la Esperanto-movado en la lando en pli ol cent jaroj, ekde kiam la unuaj esperantistoj alvenis ĉi tie en 1901.

Ĉi tiu jaro, 2016, estas unu plia jaro de kreskado kaj historiaj unuafojaĵoj. Inter la sukcesoj gajnitaj de la organizo estas la kompletigo de la Statuto de la organizo, pro kiu la organizo finfine povis kandidatiĝi por fariĝi landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en Filipinoj. La procedo estas pozitive progresanta kaj povas esti aprobita de TEJO ene de januaro 2017. La agnosko al la organizo ne nur provizos al ni reprezentatiĝon ĉe TEJO, sed ankaŭ donos al ni solidan grundon por nia agado kaj pliajn oportunojn por kunlabori kun aliaj junularaj Esperanto-organizoj tutmonde.

... ni ... vidis drastan 100% altiĝon en la membronombro de la organizo, en kiu estis 27 aliĝoj en 2016, egale al la nombro dum 2014 kaj 2015, same 27 – signifante, ke la organizo jam havas 54 membrojn laŭ la datumoj je la 31 de decembro 2016.

*Ann-Louise Åkerlund*



## Rekordaj sesioj en UAM, Poznano

**C**erte vi jam aŭdis pri la interlingvistikaj studoj en Poznano, Pollando, sub la gvidado de prof. Ilona Koutny. La nuna grupo, kiu komencis la studojn en septembro 2014, estas ĝis nun la plej granda. La septembra interlingvistika sesio (17–23.09.2016) estis jam la 5a por la gestudentoj, kiuj antaŭ du jaroj komencis siajn postdiplomajn studojn enkadre de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. En septembro 17 persistaj partoprenantoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 1 el Svedio, Serbio, Ĉeĥio, Rusio, Kroatio kaj Belgio) atingis la trian jaron de siaj studoj.

La gestudentoj denove renkontiĝis dum la 6a sesio komence de

februaro 2017. Jam alproksimiĝas la fino de la studoj.

Samtempe kun la 5a kaj 6a sesioj estis alorganizita grandan aldonan grupon da instruista trejnado: 18 personoj el 12 landoj decidis perfektigi pri instruado de Esperanto, krom la 3 el la interlingvistikaj gestudentoj. Tiun programon gvidis d-ino Katalin Kováts.

Dum la aŭtuna kaj 5a sesio la kursanoj ĝuis la kontribuojn kaj prelegojn de Zsófia Kóródy, Tomasz Chmielik, d-ro Ulrich Lins, Stefan MacGill, István Ertl, prof. Zbigniew Galor kaj prof. Probal Dasgupta. La sesio pasis en tre bona kaj internacia etoso (spektu la filmraportojn de Katalin Kováts elirante el edukado.net <http://edukado.net/novajhoj?id=646>).

La semajnon fermis la kultura festivalo Arkones (23–25.09: <http://arkones.org>, kie la gestudentoj prezentis sin) kun multaj interesaj programeroj, parte kompletigante la temojn de la studoj.

Dum la 6a sesio en februaro, estis organizita seminario kun pluraj prelegantoj, kiuj per siaj temoj tuŝis la lernadon/ instruadon de Esperanto, ĉu rilate al materialo, ĉu pri infana instruo, ĉu por pliaĝuloj ktp. Inter la prelegantoj troviĝis Renato Corsetti, Duncan Charters, Vilmos Benczik, Stefan McGill, Balasz Wacha kaj Przemyslaw Grzybowski.

*Bengt Olof Åradsson*  
surbaze de raporto de Ilona Koutny

...Kaj alvenos tiu momento, kiam jam estos malfrue! Dum nia juneco ni eĉ ne pensas pri ĝi! Nur mezaĝe ni komencas interesiĝi kaj demandi niajn gepatrojn kaj niajn geavojn pri la pasinteco, pri iliaj infanaĝaj memoraĵoj, pri la travivitaj okazintaĵoj. Poste, maljuniĝinte, konsterniĝinte ni konstatas: jam estas malfrue! Jam ne vivas tiu, kiun ni povus pridemandi! Kvankam treege ni dezirus koni, scii, ekzemple la junaĝajn memoraĵojn de niaj gepatroj, la ĝojojn kaj la ĉagrenojn, la neplenumiĝantajn sopirojn aŭ eĉ la neripareblajn preterlasojn.

Nur ili povus rakonti pri ni! Kiaj ni estis? Ni bone scias, ke ĉiuj homoj estas aliaj. Ekzistas aĝaj personoj, kiuj eĉ nepetite volonte rakontas. Eble ili sentas la alproksimiĝon de la fino, kaj neniel ili volas porti en la tombon la belajn memoraĵojn.

Sed ekzistas ankaŭ enfermiĝemaj homoj, kiuj internen vivas kaj memoras, la tiel nomataj introvertitoj, kiuj eĉ post longaj

petadoj, tre malfacile inklinas paroli pri la pasinteco.

Kvankam estus pri kio rakonti! Ja ĉies vivo estas aparta romano. Ofte estas malfacile aŭ peze por la junularo aŭskulti la tro longajn rakontojn de la maljunuloj. Ili ne scias, ke ĉi tiuj "rakontoj" gvidas al duobla celo.

La unua: tute certe, ĉi tiuj rakontoj estas fakte moralinstruoj por ĉiuj aŭskultantoj! Eĉ se ili ne povas akcepti nun la nepetitajn konsilojn, sed eble post iom da tempo ili iĝos pensigaj!

La dua: estas granda helpo por la gemaljunuloj esti aŭskultataj, ĉar la rakontado vekas en ilia animo la memoraĵojn kaj ekpensante pri ilia beleco, la tago aŭ eĉ la tuta semajno iĝos sunbrila!

Antaŭ nelonge bona amiko sendis al mi la sekvontajn liniojn dediĉitajn al ĉiuj patrinaj de la mondo. Ili estas vere pripensindaj. Mi aldonas nur mian proponon: ni demandu niajn oldulojn, dum ne estas malfrue!

Kaj nun legu atente ĉi "statistikon"!

Kion ni kredas, ke patrino scias?

Je la 4. jaraĝo: Patrino ĉion scias.

Je la 8. j: Patrino scias multe.

Je la 12. j: Patrino ne scias ĉion.

Je la 14. j: Patrino preskaŭ nenion scias.

Je la 16. j: Mia patrino? Kion ŝi scias?

Je la 18. j: Ĉi maljunulino vivis kiel infano dum la erao de dinosaŭroj

Je la 25. j: Eble patrino scias ion pri ĉi tio...

Je la 35. j: Antaŭ la decido, mi volas preparoli kun la patrino.

Je la 45. j: Certe, la patrino povas orientigi min.

Je la 55. j: Kion farus patrino en ĉi tiu kazo?

Je la 65. j: Se mi povus preparoli kun la patrino pri ĉi tiu afero...

*Julia Sigmond*  
(Ankaŭ publikigita en  
Dia Regno # 1/2017)

## Ricevu La Espero-n kiel PDF kaj legu ĝin surekrane !

Jam proksimume deko da personoj ricevas nian gazeton, La Espero, en pdf-formato. Mi sendas la gazeton per retmesaĝo ("elektronike") al tiuj, kiuj tia-maniere iom volas ŝpari la koston de poŝta sendado al SEF kaj tia-maniere iomete apogi la movadon. Krome la pdf-versio estas kolora kaj atingos la legantojn kelkajn tagojn pli

frue. Legante la gazeton sur ekrano vi ankaŭ povas pligrandigi ĝin por faciligi la legadon. Ĉu ankaŭ vi volas ŝanĝi la paperan version al pdf-versio aŭ ĉu vi simple volas provi unu-du numerojn antaŭ ol vi decidus – informu min: sef\_boarad@yahoo.se.

*Redakcio*

### Bertil Johansson †

Vår medlem i Skövde Esperantoklubb, Bertil Johansson, avled 4 december 2016. Begravningen hölls 23 december.

Bertil har varit en trogen medlem i klubben sedan 1938. Han firade sin 95-årsdag 8 september. (I La Espero 2016:3 finns en liten artikel om Bertil.)

Hälsningar  
*Birgitta*

### Wivi Nilsson †

Wivis son Lennart har meddelat att hon den 13/1 -17 avlidit på sjukhuset i sviterna efter lunginflammation.

Begravningshögtid ägde rum i Kirsebergs kyrka, Malmö, den 13/2 -17 kl 11.00.

*Sten Svenonius,*  
ordf i MEF